DEMOKRATIA KOMUNIKADO • PEDAGOGIA EFIKECO

# NIA PONTO

**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60** €. • Familia: **70** €. • Juna (ĝis 30 jaroj): **20** €.
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**JULIO-SEPTEMBRO 2025** **Nro. 144 (3/25)**



**Portugalete, sidejo de la venonta Hispana Kongreso (14/18 julio 2026)**

Aliĝilo, provizora programo, listo de aliĝintoj, informoj diversaj ĉe
**https://kongreso.esperanto.es/**

**LOKE**

## T-Ĉemizoj kun afiŝo de la Hispana Kongreso de 1953.

Nekredeble! Vidu kion trovis membro de nia E-Grupo en la retejo de "**AliExpress**". Temas pri vestaĵoj kiuj surportas la afiŝon de la 14ª Hispana Kongreso, okazinta en Bilbao en la jaro 1953.




Vi povas trovi tion ĉe

https://es.aliexpress.com/item/1005009318945910.html?spm=a2g0o.productlist.main.2.7f6baBWaaBWa7n&algo_pvid=f41eecc0-2491-4935-9036-05d386db65c7&algo_exp_id=f41eecc0-2491-4935-9036-05d386db65c7-1&pdp_ext_f=%7B%22order%22%3A%22-1%22%2C%22eval%22%3A%221%22%7D&pdp_npi=4%40dis%21EUR%2111.36%2110.79%21%21%2193.34%2188.66%21%402103985c17533466563238908ea5cc%2112000048734805902%21sea%21ES%210%21ABX&curPageLogUid=PJWxLFA1P82m&utparam-url=scene%3Asearch%7Cquery_from%3A

**Kiu disponigis la ĉemizojn? Ĉu HEF aŭ la E-Grupo de Bilbao ne havus kopirajton?**







**LOKE**

## Rafaela Urueña en Bilbao.



Meze de julio vizitis Bilbaon nia kara amikino Rafaela Urueña.

Fakte ŝi naskiĝis en Bilbao kaj ankoraŭ havas amikojn kaj konatulojn en la urbo, krom esperantistoj.

Ŝi antaŭanoncis sian alvenon kaj tio ebligis renkontiĝon ĉe kafejo.

En ege agrabla etoso ni longe interparolis pri diversaj aferoj, esperantaj kaj neesperantaj.

## Biero kun Esperanta nomo.




Jen unu plia biero kun esperanta nomo: “Sunfloro”. Aĉeteblas jam en la tuta Hispanujo kune kun aliaj bieroj havantaj esperantlingvan nomon.

*(Y.D. 24/07/2025)*

Kaj jen Esperanto en la centro de papera tablotuko, kiu surhavis la frazon “bonan apetiton” en diversaj lingvoj, en vilaĝa restoracio de la provinco Burgos:




## Nova elementa kurso.

La **vendredon 10an** de oktobro ni planas okazigi novan elementan kurson en nia sidejo. Instruanto estos nia amiko Pako López. Se vi interesiĝas pri ĝi aŭ konas aliulon, kiu povus interesiĝi, ne dubu kaj venu ĉe nin je 19:30 h.

**LOKE**

## Kristnaska loterio.

Kiel kutime, ankaŭ ĉijare ni disvendos la tradician kristnaskan loterion. La biletoj, tute en Esperanto, estos disvendataj **ekde la deka de oktobro**.
La ĉijara numero estos **33274**.

**Ĉiu bileto kostas 5 €**, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo. **Oni rezervas biletojn al neniu**. **Lasta tago por aĉeti: sabato 13a de decembro**.

**Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN-kodo: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la **skanitajn** biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankokonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li/ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

**Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet. Último día para comprar: sábado 13 de diciembre.**
**No se reservan billetes para nadie.**

Para ello,hay que seguir los siguientes pasos:

1. Primero, hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**. **Cada billete cuesta 5 €**, de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.

2. Enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** dando cuenta del ingreso.

3. Enviaremos los billetes, **escaneados**, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.

4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.

5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**HEF**

## Nova eldono de la UNED-kursoj, kun grava novaĵo.

Denove ĉijare estos instruata kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), ne nur en la du kutimaj niveloj, A2 kaj B1, sed kiel grava novaĵo, ankaŭ en nivelo B2 (laŭ la Eŭropa Referenckadro).


La kursoj B1 kaj B2 estas instruataj en Esperanto mem, do ni rekomendas ke vi sciigu pri ĝi al viaj amikoj ekster Hispanio, ĉar ankaŭ ili povas enskribiĝi, kaj tiu estas unu el la tre maloftaj kazoj en kiuj oni ricevas universitatan diplomon pro la studado de Esperanto.

Jam malfermiĝis la periodo de enskribiĝo, **ekde la 8a de septembro, ĝis la 22a de oktobro**. La kurso mem komenciĝos en novembro. Legu la praktikajn informojn (en la hispana, sed se vi havas malfacilaĵojn pri kompreno de la hispana, bv kontakti kun HEF (Hispana Esperanto-Federacio) ĉe la adreso:

https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 102. Septembro 2025)*

## LKK de la HEF-kongreso 2026 en Portugalete.



Prezidanto: Jesús Miguel García Iturrioz
Sekretariino: Milagros Mezo del Río
Kasistino: Yolanda Díez Sáiz de la Maza
Ekskursoj: Yolanda Díez Sáiz de la Maza
Amaskomunikiloj: Susana Zabaco Pérex
Retaj aferoj: Miguel Ángel Sancho
Muzika vespero: Susana Zabaco Pérex
Programo: Yolanda Díez / Carlos Llama / Jesús M. García
Kongreslibro: Enriqueta Sesmero Cutanda
Identigiloj, afiŝego por fotoj, ... Patxi de la Hoz Méndez
Eblaj subvencioj: Enriqueta Sesmero Cutanda
Kunlaborantoj: Octavio Gutiérrez Moja
Luis Alberto Lobato Reguera

## Kongreso 2026 de SAT, en Hispanio.

La kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) de la jaro 2026 okazos en la hispana urbo León (Leono) tuj post la fino de la HEF-kongreso en Portugalete, do de la 19a gxis la 26a de julio. Ĉeforganizanto estos na kara amiko Pako Balibrea.

Leono estas mezgranda urbo, kiu situiĝas nordokcidente de Hispanio, kun longdaŭra historia vivo; tiel, ĝia nomo devenas el nomo de kampadejo de romia legio. El tiu "legio", mezepoke, la vorto evoluis al "Leono". Plej famas en ĝi impona mezepoka katedralo.

Substrekinda estas la fakto, ke dum la jaro 2006 oni kunmemoros la 90a datreveno de la komenco de la hispana interna milito (1936-1939), kiu ankoraŭ estas fonto de diskutoj ene de lando kaj, certe ankaŭ ene de la kongreso.

**HEF**

## Kongreso de TEJO 2026 proksime de Barcelono.

Alia internacia kongreso okazos en 2026 en Hispanio.
Nun temas pri la kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Ĝi estos la 82a kongreso de tiu organizo por junuloj kaj disvolviĝos de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2026 en Tiana (proksime al Barcelono).


## Agadoj en diversaj hispanaj urboj.

Krom la organizado de diversaj kongresoj, nacia kaj internaciaj, pri kiu oni informas en aliaj lokoj de tiu ĉi “Nia Ponto”, okazas diversaj agadoj laŭlonge de Hispanio.

En Teruel, de la 29a de septembro ĝis la 29a de oktobro 2025 estos ekspozicio pri Esperanto pere de la kolekto de paneloj kreita de HEF.
Kaj en la sama urbo, dum la monato oktobro, oni organizos E-kurson.

En la urbo Segovia nestas la plej juna E-grupo de Hispanio. La 17an de septembro oni organizis tie propagandan agadon pri nia lingvo.

## Jam estas preta la retejo de la HEF-kongreso en Portugalete.



Danke al senlaca laboro de Miguel Ángel Sancho, jam estas preta la retejo de la venonta kongreso de HEF. Ĝi okazos en la urbo Portugalete, 12 km. de granda urbo Bilbao. La kongreso disvolviĝos de la 14a ĝis la 18a de julio 2026 en la sidejo de UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia – Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado).
Jam eblas aliĝi, rigardi la liston de aliĝintoj, koni la provizoran programon, ktp. ĉe la adreso https://kongreso.esperanto.es/

Por solvi kian ajn dubon rilate la kongreson, oni kreis specifan retadreson:
portukongreso@gmail.com



Kaj danke al sindonemo de hispana esperantisto, la 50 unuaj aliĝintoj al la 84a Hispana Kongreso de Esperanto ricevos donace la kanton “Amikoj” de la afrika kantisto Chris Freddy.
La kanto aperos en bitalbumo publikigota de Vinilkosmo ĉi-aŭtune. Kaj tuj kiam ĝi estos surmerkatigita, tiuj 50 unuaj aliĝintoj ricevos ligilon por elŝuti la kanton, ĝui ĝin premiere kaj konservi ĝin por sia propra plezuro.
Kompreneble, por tiuj kongresanoj, kiuj loĝas en la sama adreso, estos nur unu ligilo.

## TRA LA MONDO …

## Nova Estraro de UEA (2025-28).




La 26an de julio 2025 la Komitato de UEA elektis novan estraron por la Asocio. La nova Estraro de UEA enoficiĝis la 27an de julio, post la fino de la dua kunsido kadre de la ĝenerala kunveno de la Komitato, kiam ĝi akceptis la raportojn de la tiame eliranta antaŭa estraro. La novan Estraron de UEA konsistigas: Fernando Maia Jr (Prezidanto), Seán Ó Riain (1a Vicprezidanto), So Jinsu (2a Vicprezidanto), Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario), Gong Xiaofeng Arko, Zdravka Boytcheva, Miora Raveloharison, Jérémie Sabiyumva kaj François Lo Jacomo.

*(La Ondo de Esperanto. 11/08/2025)*

## UK-111 en Graco: La unua bulteno kaj la reta aliĝilo

La 111a Universala Kongreso de Esperanto okazos la 1-8an de aŭgusto 2026 en la urbo Graco (germane: Graz).

Graco estas la dua plej granda urbo de Aŭstrio. Ĝi situas meze de Eŭropo kaj estas bone atingebla: per aŭto, trajno, buso aŭ aviadile. La flughaveno de Graco situas nur 10 km for de la centro kaj estas bone ligita al ĝi per buso, fervojo, taksio. Ankaŭ de la flughaveno. Vieno veturadas rekta trajno dum ĉirjaŭ tri horoj al Graco – komforte sen trajnŝanĝo.

La unua bulteno jam estas elŝutebla ĉe https://uea.org/pdf/uk2026/Unua_Bulteno_UK2026_Graz.pdf

La reta aliĝilo funkcias ĉe https://uk.esperanto.net/2026/.

*(La Ondo de Esperanto. 11/08/2025)*

## Nekutime internacia IJK en Indonezio

Dum la ĵusa IJK en Indonezio multaj kongresanoj manifestaciis kontraŭ "genocido en Palestino" kaj alvokis al TEJO aliĝi al la kondamno. Oni anoncis, ke la sekva IJK okazos en Katalunio. La eksigita prezidanto sensukcese provis refoje iĝi komitatano.

La komitato eĉ ne donis al li parolrajton dum la kunsido. Multaj eŭropanoj spertis stomakproblemojn kaj oni ofte aŭdis la anglan.

*(Libera Folio. 19/08/2025)*

## Venontaj kongresoj kaj renkontiĝoj.

| | |
|---|---|
| **14/18 jul 2026** | **Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF) Portugalete – 12 km. norde de Bilbao – Hispanujo.** |
| 19/26 jul 2026 | Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Leono-Hispanio |
| 01/08 aŭg 2026 | 111a Universala Kongreso (UK). Graz – Aŭstrio |
| 09/16 aŭg 2026 | 82a kongreso de TEJO en Tiana, proksime de Barcelono – Hispanio. |

*(Pliaj informoj en Eventa Servo: https://eventaservo.org/ik)*

## TRA LA MONDO …

## Trump haltigas libropakaĵojn de UEA al Usono.




La libroservo de UEA ne plu povas sendi pakaĵojn al Usono. Tio estas unu el la sekvoj de la kaosa doganpolitiko de Donald Trump. Usono unuflanke nuligis regulojn pri sendogana sendado de pakaĵoj ĝis certa valoro. Ĉar nun mankas ajnaj novaj reguloj, simple ne eblas sendi pakaĵojn el Eŭropo al Usono.

*(Libera Folio je 2025-09-03)*

## La Esperanta Vikipedio atingis 375 000 artikolojn.

La 7an de septembro 2025, nur kelkajn minutojn post noktomezo (laŭ UTK), la Esperanta Vikipedio atingis sian 375 000-an artikolon. Temas pri *Pezoporus*, genro de Aŭstraliaj papagoj, verkita de la longtempa Vikipediano Kani.

Ĉi tiu impona nombro ne nur atestas pri la nekredebla laboremo de centoj da volontuloj dum la lastaj 23 jaroj, sed ankaŭ pri la vivforto de nia lingvo Esperanto. Ĉiu nova artikolo, ĉiu korektita mistajpo, ĉiu aldonita referenco estas briko en konstruado de mondo en kiu ĉiu homo povas libere partopreni en la tutaĵo de homara scio.

*(La Ondo de Esperanto. 14/09/2025)*

## Junaj esperantistoj kondamnas la agojn de la Israela registaro.

Itala Esperantista Junularo, Kataluna Esperanto-Junularo, Pola Esperanto-Junularo kaj aliaj asocioj kaj individuoj la 14an de aŭgusto en Cisarua, kie tiam okazis la 81a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, subskribis alvokon, kiu prezentas “oficialan kondamnon al la agoj de la israela registaro kaj solidarecon al Palestino, viktimo de ĉiutagaj masakroj kaj de milita strategio efektivigata kadre de pli vasta subprema plano”.

La dokumento estas subskribebla ĉe https://mallonge.net/alvoko.

*(La Ondo de Esperanto. 07/09/2025)*

## KEA: ”En Gazao la afero estas tre klara kaj akuta”.

Kataluna Esperanto-Asocio en aŭgusto faris oficialan komunikon pri la situacio en Gazao, kun la titolo ”Ĉesigu la genocidon”. Libera Folio petis la prezidanton de KEA klarigi, kial la asocio decidis fari deklaron ĝuste pri Gazao, sed ne ekzemple pri la milito en Ukrainio, kiu rekte tuŝas multajn esperantistojn.

*(Libera Folio je 2025-09-02)*